
# Jura Semajno

**Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio**

**Oktobro 1 : 2025**


## MODIFO DE LA HISPANA KRIMINALA KODO KUN LA CELO NE *REVIKTIMIGI*

Antaŭ kelkaj monatoj, ĵurnalisto en Hispanio anoncis baldaŭan publikigadon de libro, sur kiu kondamnito sciigis, detale kaj eksplicite, pri kiamaniere li murdis siajn du etajn filojn. Indas diri, ke pro tiu ago li estis kondamnita al 25-jara enkarcerigo. Tiu jura kazo estis dise konata en la tuta lando, pro la fakto ke, unuamomente, la patro informis, ke li perdis siajn filojn dum ludado en infana parko, tamen post polica esplorado oni eltrovis, ke li senkompate murdis siajn filojn, 6 kaj 2-jaraĝaj, en sia propra hejmo.




Kovrilo de la libro *"El Odio"* (La malamo), kiu fine ne estis publikigita.

Laŭ la aŭtoro de la libro, post konversacioj kun la krimulo, li povus aldoni pliajn detalojn, sendube kruelajn, pri kiamaniere la etuloj estis murditaj. Tiam, la patrino de la infanoj plendis publike, pro la fakto, ke tiu ebla publikigado kaŭzus denove ne-ripareblan domaĝon al ŝi, male la krimulo ricevus monan profiton pro la eldonado de la libro.

Komenciĝis tiam debato pri kiu rajto estas pli grava, ĉu libero pri esprimado, ĉu defendo de la viktimoj en tiaj krimoj, eĉ aperis sur ĵurnaloj nova vorto *"reviktimigi"*, tio estas, kaŭzi kroman domaĝon al viktimoj per la diskonigado de kruelaj detaloj pri la krimo plenumita.

Por eviti similajn situaciojn hispana registaro ĵus anoncis, ke la kriminala kodo estos modifita. Laŭ tio, kondamnito pro murdo povos ricevi kroman punon, tiel li ne rajtos diskonigi mesaĝojn, informojn aŭ publikigi fotografaĵojn rekte rilataj al tiu krimo dum tempo inter 5 kaj 20 jaroj.

Ĉi tiu modifo deziras eviti *reviktimigi* tiujn kiuj perdis familianojn pro krimo. Do, libero pri esprimado estos nuligita ĉar viktimoj devas esti protektitaj.

# *Vorto de la Semajno*

## DEKRETO

1. Akto kun devigaj reguloj, eldonita de konstitucie aŭ leĝe rajtigita, plej ofte ekzekutiva, organo.

*Registaro aprobis novajn normojn per dekreto.*

2. Skriba decido de ŝtatestro.


*Per reĝa dekreto tiu afero estis solene aprobita.*

## DEKRETI

Ordoni per dekreto.

*Ministraro dekretis tujan plialtigon de salajroj.*

<u>Sinonimoj</u>: *edikto, reglamento, ukazo.*



## *NOVA NUMERO DE JURA TRIBUNO INTERNACIA ANTAŬ LA JAR-FINO*

Ni jam komencis redakti la venontan numeron de *Jura Tribuno Internacia*, oficiala organo de nia asocio kaj la sola revuo en esperanto pritraktanta jurajn temojn.

Ĉiuj interesitoj povas kunlabori pere de artikolo, eseo, informoj, fotografaĵoj k.s. se ili rilatas al juraj temoj.

Do, ne hezitu sendi al ni viajn kontribuaĵojn.
jurista@esperanto.ac
www.esperantojuro.org

**JURA TRIBUNO INTERNACIA §**

N-ro 22
Jaro 2023
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

# *Internacia kalendaro*



**8-an de oktobro**: *Festo de la sendependiĝo de Kroatio.*



**9-an de oktobro**: *Festo de la sendependiĝo de Ugando.*
*Internacia tago de poŝt-servo.*

**10-an de oktobro**: *Internacia tago kontraŭ la morto-puno.*
*Monda tago de sen-hejmuloj.*



**12-an de oktobro**: *Nacia tago de Hispanio.*